

Esperanto-Universitateto

Esperanto-Universitatetoj estis ofte organizitaj de Rondo Harmonia en la kadro de Japanaj Esperanto-Kongresoj. Tiu ĉi broŝuro enhavas kvar elektitajn prelegojn:

	paĝo
Diferencoj inter lingvoj konsideritaj el la vidpunkto de perceptado de parolsonoj	2
NAGATA Hiroshi	
Rehabilitacia Medicino	8
IZUMI Yorimiti	
RFID, ĝiaj principoj kaj aplikoj	14
MORIKAWA Kazunori	
Historio de Familia Registro en Japanio	20
SASANUMA Kazuhiro	

Eldonita en 4 Aŭgusto 2007

de *Rondo Harmonia*

<http://esperanto.or.jp>

Preskosto: ¥100-

Diferencoj inter lingvoj konsideritaj el la vidpunkto de perceptado de parolsonoj

NAGATA Hiroshi
Okajama Universitato

1. Percepta apartigo de parolsonoj en malsamajn unuojn

Ni aŭdas aŭ aŭskultas parolsonojn el diversaj lingvoj. Demando staras, ĉu apartaj parolsonoj estas perceptataj sammaniere aŭ malsammaniere fare de malsamaj lingvanoj. La demandon oni povas starigi alimaniere: ĉu perceptado de parolsonoj dependas de la fizikaj akustikaj trajtoj de parolsonoj aŭ de la lingvaj trajtoj de parolantoj. Studoj montras, ke ĝi estas determinita de la lingvaj trajtoj, nome: kiamaniere ni apartigas la parolsonojn dependas de la lingvo kiun ni akiris kaj uzadas. Tiun ĉi fakton demonstris Otake kaj liaj kolegoj (1993) pere de simplaj eksperimentoj.

Al japanlingvanoj estis unue donitaj du sonstimuloj, ekzemple, *ta* kaj *tan*, kaj poste donitaj du vortoj per oreloj, ekzemple, *tanishi*

Profesoro Nagata loĝas en la urbo Okajama. Li multe laboris por Esperanto kiam li estis studento en Okajama. Kiam li ne povis partopreni en la movado, li ne forgeas nian lingvon. Li kelkfoje kontribuis artikolojn al Scienca Revuo.




Nia Rondo Harmonia organizis Esperanto-Universitateton kiel unu el fakkunsidoj unuafoje en la 88a Japan Kongreso en 2001, tiam li prezentis tiun ĉi interesan prelegon.

Retadreso: hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp

(Mo.)


kaj *tanshi*. Ilia tasko estas decidi kiel eble plej rapide, ĉu troviĝas la celstimulo, *ta* aŭ *tan*, ene de la vortoj, *tanishi* kaj *tanshi*. Trovaĵoj montris, ke japanlingvanoj tre malfacile eltrovis *tan* ene de *tanishi*, dum tiaj malfacilaĵoj ne okazis ĉe aliaj tri testkondiĉoj (Vd. Diagramon 1). Japanlingvanoj do facile eltrovis unuflanke ambaŭ celstimulojn, *ta* kaj *tan*, ene de la vorto, *tanshi*, kaj aliflanke *ta* ene de la vorto, *tanishi*.

Diagramo 1.
Mezvaloroj de procento-malsukceso ĉe japanlingvanoj (Diagramo eltirita el Otake k.a., 1993, p.265, kun modifoj enmetitaj).



Tamen malsamaj rezultoj estis akiritaj ĉe franclingvanoj (Vd. Diagramon 2). Plej granda diferenco koncernas tion, ke franclingvanoj eltrovis la *ta*-sonon pli malfacile ol la *tan*-sonon en *tanshi*, kontraste kun japanlingvanoj. Koncerne alian vorton, *tanishi*, rezulto estis simila al tiu de japanlingvanoj, kvankam la diferenco inter la du sonstimuloj estis ne tiom rimarkebla kiel en japanlingvanoj.

Diagramo 2.
Mezvaloroj de procento-malsukceso ĉe franclingvanoj (Diagramo eltirita el Otake k.a., 1993, p.271, kun modifoj enmetitaj).




Kial do okazis tia diferenco inter japanlingvanoj kaj franclingvanoj? Japanlingvanoj disigas la *tan*-sonon en du partojn,

t.e. *ta* kaj *n*, dum franclingvanoj ne disigas ĝin. Por franclingvanoj *tan* estas percepte nedisigebla unuo. Tio ĉi montras, ke japanlingvanoj kaj franclingvanoj perceptas saman parolsonon surbaze de malsama sonunuoj. Alivorte, *tan* havas du sonunuojn por japanlingvanoj, dum ĝi havas nur unu sonunuon por franclingvanoj. Tiu ĉi diferenco koncernas la diferencon inter morao kaj silabo. Nome, *tan* enhavas du moraojn sed nur unu silabon. Sammaniere, *tanshi* enhavas tri moraojn, *ta*, *n*, kaj *shi*, sed nur du silabojn, *tan* kaj *shi*. Unufraze, la trovaĵoj de la supra esploro indikas, ke japanlingvanoj perceptas parolsonojn surbaze de moraoj, dum franclingvanoj perceptas ilin surbaze de silaboj. (Notu ĉi-okaze, ke japana hajko konsistas el 17 sonunuoj, sed 5-7-5 ritmo estas mezurata per moraoj, ne per silaboj.)

Kiel statas anglalingvanoj? Surprize, ili ne spertas malfacilaĵon eltrovi ambaŭ sonstimulojn el la du malsamaj vortoj (Vd. Diagramon 3). Klare estas, ke anglalingvanoj perceptas parolsonojn ne surbaze de moraoj nek surbaze de silaboj. Onidire, la angla estas la lingvo kiu ne havas klaran limon inter silaboj kaj havas anstataŭe ritmon kun akcentado. Tion ĉi oni povas vidi per kelke da ekzemploj.

Diagramo 3.
Mezvaloroj de procento-malsukceso ĉe anglalingvanoj (Diagramo eltirita el Otake k.a., 1993, p.268, kun modifoj enmetitaj).



Mi trovis jenajn skribaĵojn, kiujn skribis ses-jaraĝa infano (キャソ, castle; グンナイ, Good night; ライ, right; ワチオネイム?, What's your name?; ヨウフェイカン, You're welcome). Ŝi ripetis aŭskulti anglan rakonton surbendigitan kaj skribis per si mem, uzante strekajn kanaojn, kiel anglaj parolsonoj sonis al ŝiaj oreloj. Se oni surmetas akcentitan ritmon, la skribaĵoj sonas kvazaŭ anglaj vortoj aŭ frazoj, eĉ se oni prononcas ilin en japaneca anstataŭ angleca maniero. Akcentado kun apartaj ritmoj, ŝajne, fariĝas akustikaj

signaloj, kiujn utiligas anglalingvanoj.

Aliaj esploristoj (Cutler k.a., 1983, 1986, 1989) demonstris, ke la supraj fenomenoj okazas sendepende de vortoj aŭ ne-vortoj testitaj, nome: franclingvanoj perceptas kaj apartigas laŭ sia akirita maniero de perceptado ne nur vortojn el la franca sed ankaŭ tiujn el aliaj lingvoj, kaj anglalingvanoj prilaboras vortojn sammaniere laŭ sia propra perceptado.

2. Distribuo de tempodaŭroj por vokaloj kaj konsonantoj


El la vidpunkto de perceptado la franca kaj la japana havas silabstrukturon pli klaran ol la angla. Tio sugestas, ke malsamaj lingvoj estas priskribeblaj helpe de malsamaj distribuoj de vokaloj kaj konsonantoj. Ĝuste tian esploron faris eŭropaj esploristoj (Ramus k.a., 1999).

Ili unue kreis testfrazojn en la franca, kaj ilin tradukis al sep malsamaj lingvoj, la angla, la pola, la nederlanda, la hispana, la itala, la kataluna, kaj la japana. Ĉiuj testfrazoj estas legitaj de denaskaj parolantoj kaj analizitaj per du variantoj. Unua varianto estas %V, nome: proporcio de tempodaŭroj por vokaloj ene de la testfrazoj, kaj la dua estas ΔC, nome: varianca devio de tempodaŭroj por konsonantoj ene de la testfrazoj. Ekzemple, aro da anglaj vortoj, "next Tuesday on," estas fonetike transskribebla kiel /nɛkstjuzdeɪɒn/. Tiu ĉi konsistas el du tipoj de tempodaŭroj: unu estas por aro da konsonantoj, /n/, /kstj/, /zd/, kaj /n/ kaj alia por aro da vokaloj, /ɛ/, /u/, kaj /eɪ/.

Diagramo 4, kiu lokalizis 8 lingvojn pere de la du variantoj, %V kaj ΔC, montris, ke la japana estas la lingvo en kiu vokaloj estas iom rimarkeblaj, dum la angla estas plej alta en konsonanteco el la ok lingvoj. Ĝi ankaŭ montris, ke la japana estas la lingvo en kiu tempodaŭro por konsonantoj estas ne tiom varia, dum la angla estas la lingvo en kiu ĝi estas tre varia. La distanco inter la du lingvoj estas plej malproksima el ĉiuj distancoj inter la ceteraj du lingvoj. La trovaĵoj sugestas, kial malfacila estas por japanlingvanoj percepti fonetikajn trajtojn de la angla. La angla estas tre malsama ol la japana, se temas pri akustikaj trajtoj kaj sekve pri perceptado de parolsonoj.

Diagramo 4.
Distribuo de 8 lingvoj
lokalizitaj du-dimensie
(%V, ΔC).

Eraroj: ±SEM.
(Diagramo eltirita el
Ramus k.a., 1999, p.273,
kun modifoj enmetitaj).



La diagramo ankaŭ montras interesan grupigon de la ok lingvoj. Tri lingvoj, la angla, la pola kaj la nederlanda, formas unu grupon. Tiuj ĉi, laŭ la esploristoj, estas lingvoj kun akcentita ritmo. Kvar lingvoj, la hispana, la itala, la franca kaj la kataluna, formas duan grupon. Tiuj ĉi estas ĉiuj latinidaj, lingvoj bazitaj sur silaboj. Kaj unu sola, izolita lingvo estas la japana, morao-bazita lingvo. La esploro sugestas, ke la tri tipoj de perceptado de parolsonoj, per-silabo, per-morao kaj per-ritmo kun akcentado, estas parte korelativaj kun la distribuoj de tempodaŭroj por vokaloj kaj konsonantoj.

3. Esperanto konsiderita kadre de la supraj trovaĵoj

Akustikaj trajtoj donas al malsamaj lingvoj malsamajn trajtojn kiuj karakterizas kiel malsamaj lingvoj sonas al niaj oreloj. Laŭ la supra analizo, la angla sonas al ni japanoj pli malsame ol la itala aŭ la franca aŭ aliaj latinidaj lingvoj. Kiel aspektas Esperanto rilate al la supraj trovaĵoj?

Bedaŭrinde estas, ke ni ne havas psikolingvistikajn datumojn kiuj sugestas kiel Esperanto statas pri homa perceptado de parolsonoj aŭ pri distribuo de tempodaŭroj por vokaloj kaj konsonantoj. Oni diras, ke Esperanto sonas kvazaŭ la itala, la lingvo surbazita sur silaboj. Se pravus tiu onidiro, ni povas supozi, ke Esperanto similas al silabo-bazitaj lingvoj kiel la franca kaj la itala. Tiu ĉi supozo, ŝajnas al mi, estas trafa kaj pruvebla se ni farus psikolingvistikajn eksperimentojn aŭ analizus distribuon de

Esperantaj parolsonoj. Prave estas, ke Esperanto estas la lingvo en kiu vokaloj kaj konsonantoj plej ofte aperas inter si kombinite. Tiu-rilate, Esperanto kredeble apartenas al silabo-bazitaj lingvoj.

Krome estas alia trajto, kiu karakterizas vortojn de Esperanto. Tio koncernas du tipojn de finaĵo, *n* kiel la indikilo de akuzativo kaj *j* kiel la indikilo de plureco. Tiuj ĉi du finaĵoj aperas en Esperantaj esprimoj tiel multfoje, ke ili donas al la lingvo karakterizan ritmon de paroloj. Plue, ili plenumas tre gravan rolon kaj sintaksan kaj morfologian. Ankaŭ en parolsonoj ili devas esti markitaj ne kiel simplaj aldoniĵoj de antaŭirantaj vortelementoj sed kiel sendependaj sonunuoj. Kaj la du finaĵoj ne estas vokaloj sed konsonantoj. Tiu-rilate, la du finaĵoj havas trajton similan al moraoj. Se pravas tiu ĉi supozo pri la rolo de la du finaĵoj, sekvas alia supozo, ke Esperanto proksimiĝas al la japana lingvo kiel la lingvo perceptata surbaze de moraoj. Tio ĉi indikas, ke Esperanto estas facile perceptebla al japanlingvanoj.

4. Konkludo

Necesas esploroj por pruvi tiujn ĉi supozojn. Tamen, almenaŭ psikolingvistike konsiderite, ni povas kredi, ke Esperanto estas lingvo, facile perceptebla kaj tial facile lernebla por japanlingvanoj.

Referencoj

- Cutler, A., Mehler, J., Norris, k Segui, J. (1983). A language-specific comprehension strategy. *Nature*, 304, 159-160.
- Cutler, A., Mehler, J., Norris, k Segui, J. (1986). The syllable's differing role in the segmentation of French and English. *Journal of Memory and Language*, 25, 385-400.
- Cutler, A., Mehler, J., Norris, k Segui, J. (1983). Limits on bilingualism. *Nature*, 340, 229-230.
- Otake, T., Hatano, G., Cutler, A. k Mehler, J. (1993). Mora or syllable? Speech segmentation in Japanese. *Journal of Memory and Language*, 32, 258-278.
- Ramus, F., Nespor, M., k Mehler, J. (1999). Correlates of linguistic rhythm in the speech signal. *Cognition*, 73, 265-292.
- (Fino)

Rehabilitacia Medicino

IZUMI Yorimiti
Kuracisto

0. Enkonduko


Hodiaŭ mi parolas pri rehabilitacia medicino. La tempo donita por mi estas limigita, tial mi devas paroli nur koncize. Do, nur teorian flankon mi deziras klarigi. Kaj la plejparto de ĉi-foja parolado devenas de la japanlingvaj skribaĵoj de Doktoro UEDA Satoŝi, kiu estas esperantisto.

S-ro Izumi loĝas en la urbo Ueda en la gubernio Nagano. Li lernis Esperanton kiam li estis studento. Li aktive agadis por nia lingvo post la gradiĝo de universitato.

Kiam Interreto ekdisvastiĝis, li penis instrui tiun teknikon por esp-istaro utiligante sian talenton, kaj li klopodis en tiu kampo.

Nia Rondo Harmonia organizis Esperanto-Universitateton kiel unu el fakkunsidoj unuafoje en la 88a Japana Kongreso en 2001, tiam li prezentis tiun ĉi prelegon.

Retadresoj: aminda1@mac.com, aminda@akeyu-hp.com



(Mo.)

1. Kio estas la senco de rehabilitacio?



La vorto rehabilitacio signifas en originala senco reinstalon, reheimigon, kaj rehonorigon. Nome ĝi signifas reakiron de rajto, kompetenteco, honoro, ktp.

Kaj en medicino kampo rehabilitacio signifas reakiron de homeca vivo. Pro malsano oni eniras en mizeran situacion. Oni perdas sian funkcion kaj ekhavas difekton, kaj malkapablas vivi ordinare. Tio kaŭzas handikapon. Tial por vivi homece, unue oni devas akiri kapablon de agadoj de ĉiutaga vivo. Tio estas la unua paŝo al hejma vivo. La dua paŝo estas socia integriĝo.

2. Tri katakteroj de rehabilitacia medicino



Komparante rehabilitacian medicinon kun ordinara medicino, ni vidas tri karakterojn.

Unue en la vidpunkto de la celo rehabilitacia medicino estas medicino por reakiri la rajton de homeca vivo. En ĝisnuna medicino la vidpunkto de socia vivo estis ĝenerale manka.

Due en la vidpunkto de la objekto rehabilitacia medicino estas medicino de malkapablo. Ni ne nur trakti malsanon, sed ankaŭ trakti malkapablon. Kaj plejparte difekto mem ne estas kuracebla.

Trie en la vidpunkto de la metodo rehabilitacia medicino estas medicino laŭ eduka kaj kompensa maniero. Por gajni diversajn kapablojn malsanulo devas lerni novan metodon kaj uzi kompensajn instrumentojn.

3. Kion celas rehabilitacio?



Persono kun malkapablo ne nur havas malkapablon, sed ankaŭ havas sanan funkcion kaj kapablon kaj individuecon. Ĉe malkapablulo malkapablo estas nur unu parto, sed ne tute.

En rehabilitacia procezo plimultigo de pozitiveco estas esenca, tio estas kreskigo de atenta kapablo. Kaj en la procezo plimalmultigo de negativeco estas bezonata, tio estas reduktado de malkapablo.

La celo de rehabilitacio estas efektivigo de la plej alta kvaliteco de vivo. Tio signifas starigon de nova vivo.

4. La strukturo de malkapablo



Ordinare oni pensas, ke difekto devenas de malsano, malkapablo devenas de difekto, kaj handicapo devenas de malkapablo. Kaj medio, kiu estas socia cirkonstanco, donas influon al handicapo. Tio baziĝas sur la malnova koncepto de la Monda Organizo pri Sano. Kaj Doktoro Ueda Satoŝi aldonis la novan koncepton de malkapableco kiel sperto, kiu estas subjektiva malkapableco. Dume difekto, malkapablo, kaj handicapo estas objektivaj malkapablecoj.

5. La strukturo de funkciado kaj malkapablo



En la nove bakita koncepto de la Monda Organizo pri Sano, la terminaloj ŝanĝiĝis de negativaj vortoj al pozitivaj konceptoj. Nome malsano fariĝis sana kondiĉo, difekto fariĝis korpaj funkcioj kaj korpaj strukturo, malkapablo fariĝis agadoj, handicapo fariĝis partopreno. Dume medio malaperis kaj kontekstaj faktoroj kaj personaj faktoroj aperis.



Kaj negativaj vortoj kontraŭ agadoj kaj partopreno fariĝis agada limigo kaj partoprena restrikto.

6. Diversaj agadoj en agada nivelo



Mi jam parolis pri la situo de agadoj en rehabilitacio. Do, mi klarigas la enhavon de agadoj pli detale. En agada nivelo troviĝas diversaj agadoj.

La plej bazaj estas agadoj de ĉiutaga vivo. Por vivi hejme oni devas akiri kapablon de agadoj de ĉiutaga vivo. Tio enhavas paŝadon, manĝadon, purigadon de vizaĝo kaj dentojn, ŝanĝadon de vestoj, necesadon, kaj baniĝadon.

Due agadoj de socia vivo estas grava. Por vivi hejme domlaboro estas necesa. Por aĉeti ion ekstereniro estas necesa, por kontakti aliajn parola aŭ skriba komunikado estas necesa.

Trie sociaj spertecoj estas bezonataj. Por vivi oni devas havi bonan rilaton unu al alia. Tial sperteco de homa interrilato estas grava.

Sekvante okupaj talentoj estas bezonataj por gajni monon.

Fine ekzistas senokupaj kapabloj. Kapablo utiligi liberan tempon ankaŭ estas necesa por ĝui vivon.

7. Rehabilitacia kunlaboro



En rehabilitacia procezo pluraj laborantoj estas bezonataj. Unue ĉirkaŭ persono kun malkapablo estas liaj aŭ ŝiaj familianoj. En medicina kaj flega servoj estas fiziatriisto, kiu estas kuracisto pri rehabilitacio, flegisto, fizika terapistoj, okupa terapistoj, parolaj terapistoj, protezistoj kaj ortotistoj. En psiko-sociaj servoj estas klinika psikologisto kaj socia laboristo. Ilia kunlaboro estas grava en medicina rehabilitacio. (Fino)

RFID, ĝiaj principoj kaj aplikoj

MORIKAWA Kazunori
Inĝeniero pri elektroniko

Unu ekzemplo de RFID: Suica kaj ICOCA

Sen-kontaktaj IC-kartoj uzeblaj en Aŭtomata bilet-kontrola maŝino.
IC: Integra cirkvito

“Suica” uzata en Kanto




El: JR Orienta-Japanio

“ICOCA” uzata en Kansajo



El: JR Okcidenta-Japanio



Komunikebla distanco inter Karto kaj Legilo estas nur 10 cm por ke radio-ondo el la legilo ne influu Korstimulilon enkorpigitan. Tial pasaĝero kontaktigu la karton kun la legilo.

S-ro Morikawa loĝas en la urbeto Oyamazaki apud la urbo Kioto.

Li lernis Esperanton kiam li estis studento. Li longe agadas en Rondo Harmonia, kaj nun li estas redaktoro de “La Harmonio”, organo de Rondo Harmonia, kaj ret-informiloj.


Li profesie okupiĝas je entrepreno de RFID, pri kiu li prezentis tiun ĉi prelegon en 2003.

Retadreso: kz_morikawa@yahoo.co.jp
<http://d.hatena.ne.jp/kzmorikawa/>



1. Kio estas RFID? (1) Aŭtomataj Identigoj


RFID estas unu el Aŭtomataj Identigoj.




1. Kio estas RFID? (3) Du bazaj principoj

Fizikaj Principoj	Per Elektromagneta Indukto	Per Elektromagneta ondo (Radio-ondo)
	Alterna magneta kampo Legilo RF-etikedo (Reflektilo)	Elektro-magneta ondo Legilo RF-etikedo (Reflektilo)
Frekvencoj	135 kHz aŭ malpli 13.56 MHz	860 - 960 MHz 2.4 GHz
Karakteroj	Certa komunikado malgraŭ mallonga komunikebla distanco	Longa komunikebla distanco

1. Kio estas RFID? (2) Sistema de RFID



2. Indukta tipo (1) RF-etikedoj



Monera tipo uzanta frekvencon de 125 kHz



Rulo da Ebenaj etikedoj uzantaj ĉe 13.56MHz




Kartoj kun 86 mm kaj 54 mm

2. Indukta tipo (2) Principo pri Indukto

IC: Integrata cirkvito

- Ĝia principo estas ke Alterna magnetika kampo aperigas Elektran tension en Bobeno de RF-etikedo sub fenomeno de Elektro-magnetika Indukto.
- IC de RF-etikedo konsumas tre ege malgrandan elektran energion kaj havas ne-volatilajn memorojn.
- RF-etikedoj resendas datumojn al Legilo per reflektado, utiligante sinsekvan magnetan kampon kiun Legilo radiigas.





3. Aplikoj (1) Produkta kontrolo en fabriko

RFID estas ofte uzata en Produkto-linioj de Fabrikoj ekde la lasta duono de 1980aj jaroj. Kiam multaj variaĵoj da produktaĵoj fluas en unu produkto-linio, RFID estas utila por identigi ĉiujn variaĵojn.

Produkto-linio por Hejm-aparatoj


Fabriko por produkti Aŭtomobilojn



Datumoj de RF-etikedo montriĝas sur ekrano.

2. Indukta tipo (3) Strukturo de RF-etikedo


Malmultekostaj RF-etikedoj estas produktitaj per la plej novaj teknikoj.



3. Aplikoj (2) Aŭtomata kalkulo en manĝejo

Aŭtomata kalkulo-sistemo uzanta RFID-on funkcias en kafeteria manĝejo de kompanio aŭ organizo. Ĝi ebligas rapidan kalkulon, malmultigon de laborantoj kaj aŭtomatan enketon de venditaj manĝaĵoj.


Kalkula rezultato montriĝas sur ekrano.



Ĉi-sube instaliga granda RFID-legilo kaŝe. Legilo de Magneto-stria karto

3. Aplikoj (3) Aŭtomata kalkulo en Suŝiejo

Aŭtomata kalkulo-sistemo uzanta RFID-on funkcias ankaŭ en Suŝiejo. Ĝi ebligas rapidan kalkulon, aŭtomatan enketon de specoj kaj kontrolon de freŝeco de suŝioj.



3. Aplikoj (4) Kontrolo de libroj en Biblioteko

Libro-kontrola sistemo uzanta RFID-on funkcias en kelkaj bibliotekoj. Ĝi ebligas mallongigon de labora tempo por kontroli libron kaj ĝi povas detekti ŝtelon de libroj.

RF-etikedo en libro



Pordo-tipaj RFID-legiloj

Historio de Familia Registro en Japanio

SASANUMA Kazuhiro
Redakisto de lernolibroj

Historio de Familia Registro en Japanio

2006.10.8

La 93a Japana Esperanto-Kongreso

SASANUMA Kazuhiro

S-ro Sasanuma loĝas en la urbo Otsu en la gubernio Shiga apud la urbo Kioto.

Li lernis Esperanton kiam li estis studento. Li longe agadas en Rondo Harmonia, kaj nun administras la retejon "esperanto.or.jp".

Li delonge studis Familian registron, kaj li prezentis tiun ĉi prelegon en 2006.

Retadreso: kaz-ssnm@nifty.com

(Mo.)



Funkcio de nuna Koseki [戸籍]

- La **atestilo** de **persona stato kaj parenceco**
 - informoj pri naskiĝo, edziĝo, morto, gepatroj, gefiloj, ktp.
 - utila por rapida kaj ekzakta procedo pri heredo, edziĝo, pasporto, ktp.
- La **atestilo** de **japana ŝtataneco**

atestilo (kopio) de papera Koseki

(1の1) 全部事項証明	
本 籍 氏 名	福井県福井市大手三丁目10番 福井 太郎
戸籍事項 戸籍改製	【改製日】平成17年11月5日 【改製事由】平成6年法律第51号附則第2条第1項による改製
戸籍に記録されている者	【名】太郎 【生年月日】昭和49年3月17日 【配偶者区分】夫 【父】福井一郎 【母】福井和子 【続柄】長男
身分事項 出 生	【出生日】昭和49年3月17日 【出生地】福井県福井市 【届出日】昭和49年3月20日 【届出人】父
婚 姻	【婚姻日】平成12年12月12日 【配偶者氏名】北條花子 【従前戸籍】福井県福井市大手三丁目10番 福井一郎
戸籍に記録されている者	【名】花子

atestilo de datumigita Koseki

La sistemo de familia registro en 4 epokoj

- **Antikva epoko** (komenco de registra sistemo)
- **Mezepoko** (epoko sen registra sistemo)
- **Frua moderna epoko** (la epoko de Edo)
(reviviĝo de registra sistemo)
- **Moderna epoko** (evoluo de modernigita sistemo)


Antikva epoko

(komenco de registra sistemo)

- **La Rituryô-sistemo** enkondukita en la 7-a jarcento bezonis familian registradon.
(por disdoni kultivejon kaj kolekti impostojn)
- 670: **Kôgo-nenzyaku** [庚午年籍]
(la 1-aj tutlandaj registroj)
- 690: **Kôin-nenzyaku** [庚寅年籍]
(komenciĝis kompilado en ĉiu 6 jaroj)

Mezepoko (epoko sen registra sistemo)

- Laŭ la detruigo de la Rituryô-sistemo malaperis registra sistemo.
Evoluo de "Sôen" [莊園: privata bieno]
↓
Ĉeso de disdonado de kultivejo (10-a jarcento)
↓
Ĉeso de kompilado de registroj (11-a jarcento)
- En mezepoko oni **ne bezonis** familiajn registrojn.



Koseki laŭ Taihō Rituryō

Frua moderna epoko (la epoko de Edo)

(reviviĝo de registra sistemo)

- **Censo por fari devigan militservon**
komenciĝis en la 16-a jarcento
→ **Ninbetu-tyō** [人別帳]
- **Religia kontrolo** (por forigi kristanismon)
stabiliĝis en la lasta duono de la 17-a jarcento
→ **Syūmon-aratame-tyō** [宗門改帳]
→ **Syūmon-ninbetu-aratame-tyō** [宗門人別改帳]
(ĉiuj loĝantoj, en ĉiu jaro)



Syūmon-ninbetu-aratame-tyō

formo 1872 (明治5年式戸籍・壬申戸籍)

- La 1-a tutlanda registra sistemo en komuna formo havis 3 flankojn.
 - **censo**
 - **domicila (loĝadeja) registro**
 - **stata registro**

+

(klaso, profesio, religio, sigelo de familioestro)
- Por **konskripcii, imposti, teni publikan ordon**, ktp.

Moderna epoko

(evoluo de modernigita sistemo)

Por centralizita modernigita ŝtato preciza sistemo estis bezonata.

formo 1872 [明治5年式戸籍・壬申戸籍]

formo 1886 [明治19年式戸籍]

formo 1898 [明治31年式戸籍]

formo 1914 [大正3年式戸籍]

formo 1948 [昭和23年式戸籍]

formo 1886 (明治19年式戸籍)

Granda **plibonigo** de la formo 1872

- detale decidi registrendaj aferoj
- difini regulojn de aldono kaj forigo



Stabiliĝo de registra sistemo en moderna epoko

formo 1898 (明治31年式戸籍)

- Nova formo laŭ **la civila leĝo**, kaj la nova leĝo de familia registro en 1898
- Bazita sur **la familia sistemo**
→ la registro difinis la leĝan familion.
- **Persona stata registro** [身分登記簿]
Pri naskiĝo, edz(in)iĝo, morto, ktp.
Unue oni registriĝis en persona stata registro, kaj poste transskribiĝis en familia registro.

formo 1914 (大正3年式戸籍)

- Detala registro **kun stataj informoj**
(unuiĝo kun persona stata registro)



En tiu tempo sub la familia sistemo
persona registrado ne estis bezonata.

formo 1948 (昭和23年式戸籍)

- Nuna formo bazita sur **la nova civila leĝo**
 - familio → **geedzo**
 - familiestro → **ĉeffamiliano**
[戸主] [筆頭者]
 - klaso → (malaperigita)
- Malnova formo transskribita en 1957~1965

En aliaj landoj

- **Ĉinio** originala sistemo funkcias
- **Koreio** Koseki nuliĝos en 2008
- **Tajvano** Koseki estas ne ofte uzata
- Sistemoj en eŭropaj landoj ne estas bazitaj sur la ideo pri familio en orienta azio.